



PENSEO

N-ro 119
Sep./2001

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997

www.anteo.domainvalet.com



Oksigen-Produktaj

Ĉeloj

Sun Xiaoya

Vere bela estas la vestaĵo tajloritan el platana ŝelo, kiun mi aĉetis post kiam mi multe profitis de la negoco kun tiuj malsaĝaj loĝantoj de Boti-planeto pri liganaj metiartaĵoj faritaj de mi mem.

Kiam mi, zumante, prove surportis mian novan vestaĵon, bonega novaĵon preskaŭ ridigis min ĝismorte. Aŭskultu tio, kion diris la anoncistino envolvita en vestaĵo el kapoka ŝelo, “Je dudek kvar minutoj ppost la sepa, Kosmonaŭtika Buroo jam gajnis kontakton kun Heliqi-planetanoj en Lat-9-a Kosmo. Ili havas grandan intereson pri niaj lignaj metiartaĵoj. Bonŝanco por granda profito! Grandaj teranoj, ne perdu la bonŝancon!”

Vere inspira novaĵo! Forĵetinte mian novan vestaĵon, mi prenis lingvo-rompan ŝpruciĝilon kaj kuris, sen reteni mian paciencon, en la arbaron malantaŭ mia domo. ŜŜ! Ŝpruciĝis nuboj da lingvo-rompa pulvoro. Kvin arbegoj falis, kaj mi tirigis ilin en mian laborejon. Ĉu vi scias, kial mi volas tiujn rondajn lignojn? Ĉar ili estas profitdonaj! Ekde 2030-a jaro, la estaĵoj el aliaj planedoj, kiuj ekhavis kontakton kun ni teranoj, senescepte multe interesiĝis pri niaj lignaj metiartaĵoj. Simpla estas la kialo, ĉar lignoj produktiĝas nurnure sur la Tero. Ali-planedanoj volis aĉeti malnovan plumujo el lingvo eĉ per altega prezo: 5000 unuoj de la valuto de la Tero. Do, ni komencis plene utiligi niajn riĉfontojn. Ĉiuj vivas de vendado de lignaj metiartaĵoj al ali-planedanoj. Pro tio, nemalmultaj teranoj riĉiĝis. Por pli bone konatigi la lignajn metiartaĵojn de la Tero, la registaro, krom publikigo de afiŝoj en televidaj programoj de Inter-planeda Televid-stacio, kondiĉas, ke teranoj devu surhavi vestaĵojn faritajn el lingvo por altiri ali-planedanojn.

Post kelkaj tagoj, la lignaj metiartaĵoj, kiujn mi fabrikis, gajnis el la manoj de Heliqi-planedanoj multon da monbiletoj.

Tio estas ja profitdona afero! Mi vere dankas niajn prapatrojn pro ties bona heredaĵo – arboj.

Pro senĉesa plimultiĝo de turistoj el aliaj planedoj, la arboj malantaŭ mia domo jam elĉerpiĝis. Do mi disponigis al mi per kontrakto multajn arbojn sur alia monto. Sed dum tiu tempdaŭro, mi ne fartis bone kaj mi ofte sentis malkomfortecon en pulmo. Krome, naturo staris kontraŭ ni: daŭra malboniĝo de la aera kvalito, plua serioziĝo de grunda erozio kaj oftaj atakoj de pluvaj ŝtormoj. Pri tio, kaj aŭtoritatuloj kaj ordinaraĵoj popolanaj ne povis trovi la kialon.

Tre baldaŭ la arboj sur la Tero jam elĉerpiĝis. Sen arboj ne produktiĝis lignaj metiartaĵoj, kaj sen lignaj metiartaĵoj la teranoj ne havis rimedojn por vivteni sin. La Tero, kie regis paco kaj trankvilo, abrupte falis en kaoson. Senbridaj uraganoj kaj diluvo rapide devoiris multajn regionojn kaj ĵetis teranojn en panikon de morto...

“Hej, frato,” diris la Tero, kiu per sia diketa travidebla anteno tuŝis Marson, “Mia kapo iomete doloras.”

“Mi akompanu vin al Kosma Hospitalo por ekzameno.”

...

“Frato Marso, kio estas la rezulto de la ekzameno?” demandis la Tero, kiu ĵus eliris el la ekzamenĉambro.

“Libera de zorgoj. Nenio grava okazis. Nur pro tio, ke mortis ĉiuj verdaj oksigen-produktaj ĉeloj sur la maldekstra parto de via cerbo, vi sin trovas en malforta manko de oksigeno.” Marso ridete diris, “Jen estas via preskribo.”

Nur kelkaj vortoj skribiĝis sur ĝi: planti aron da arboj.

elĉinigi **Hongjia**

EL «LAŬZI»

ĈAPITRO 29



(Tiu ĉi ĉapitro montras la politikan penson de Laŭzi pri “senagado”.

Li opinias, ke la homa penado

signifas preskaŭ nenion antaŭ la objektiva mondo, kaj tial la homo havas nenian alian elekton krom lasi la

aferojn sekvi sian naturan vojon de disvolviĝo kaj sekve devas fari nenion, kio estas super lia povo, nek preni ekstremajn rimedojn.)

Tiu, kiu deziras ekregi la mondon kaj atingi iajn rezultojn,
Laŭ mi certe ne sukcesos.
La homa mondo, kiu estas io sankta,
Ja ne povas esti arbitre traktata.
Tiu, kiu arbitras al ĝi, ĝin detruas;
Tiu, kiu penas ĝin teni, ĝin perdas.
Tial el ĉiuj estaĵoj de la mondo
Iuj iras antaŭe dum aliaj sekvas,
Iuj varme spiras dum aliaj malvarme blovas,
Iuj estas fortaj dum aliaj estas malfortaj,
Iuj estas sekuraj dum aliaj estas en danĝero.
Tial la Saĝulo evitas la ekstremecon, la troecon kaj la
ekscesecon.

ĈAPITRO 30

(Tiu ĉi ĉapitro montras la kontraŭmilitan penson de Laŭzi. Laŭ li, la milito estas detrua kaj kruela, sekve ĉiel evitenda, kaj tial, se minacate de atako oni estas devigita fari militon, oni tiam devas singarde trakti ĝin kaj ĉesigi ĝin tuj post gajno de la batalo. Plie, oni ankaŭ ne devas paradi per forto, nek aroganti pro sia venko, ĉar la milito ja estas farita malgraŭvole.)

Tiu, kiu helpas la reganton en la maniero de la Taŭo,
Konsilas al li regi la mondon ne per forto.
La uzo de forto baldaŭ ricevas repagon:
Tie, kie la armeoj restis, abunde kreskas dornaj arbetaĵoj,
Kaj grandaj militoj estas ĉiam sekvataj de malsatego.
Tial la saĝa generalo kontentigas sin per sia unua sukceso kaj
ĉesas,
Ne kuraĝante plu ekspluati sian venkon.
Atinginte sukceson, li ne fanfaronas pri ĝi,
Atinginte sukceson, li ne sin gloras per ĝi,
Atinginte sukceson, li ne arogantas pro ĝi,
Atinginte sukceson, li prenas ĝin kiel ion faritan malgraŭvole,
Atinginte sukceson, li ne paradas per sia forto.
La estaĵoj, atinginte sian plejfortecon, devas kreski maljunaj¹,
Kio estas kontraŭ la Taŭo.
Kaj ĉio, kio estas kontraŭ la Taŭo, senescepte iras al sia baldaŭa
pereo.

¹ Tial, laŭ Laŭzi, oni preferu esti en malforteco kaj moleco.

POEMOJ DE LOTUS-FLOROJ

verkitaj de Lu Jixin

VEKIĜO DE LOTUS-LAGO

Aŭroro tenera,
Zefiro leĝera,
La lago kvietaj vekigas oscede.

Jen folioj vervaj,
Ĉu okuloj verdaj,
Al tero ĝentile salutas poete.

Vivama favoro,
Lotusa ruĝfloro,
La sunon matenan flamigas impete.



JEN AL VI

Vizaĝon kun verovo,
Aromon el verso,
Dediĉi jen al vi!

Rideton karminan,
Kristalon animan,
Dediĉi jen al vi!

Honteman gracion,
Tre freŝan pacion,
Dediĉi jen al vi!

Koreton amplena,
fervoron sinceran,
Dediĉi jen al vi!

HAZARDE RENKONTIĜO

A: Duone mi nergigas
sub la akvo,
Duone malnerigas
sopiri l' ĉielon,
---Mi estas boato.

B: Mi radikas en ŝlimo
sub la akvo,
Kapo-levas el ŝlimo
sopiri l' ĉielon

---Mi estas lotuso.

SOMERA LOTUSFLORO

Lage, ombas nigra verdo,
Naĝas nubo kun leĝer' do.

Sur la nubo vi aperas
Honte kaj diskrete helas.

Rond-folien bela volo
Perlas kristale el koro.

Inter perloj vi kvietas
En somera song' ridetas.

LOTUSFLORO EL MARĈO

Blankfloro el nigro de marĉo,
Meditas sub matena varmo,
Kun virga animo sen pulvo,
Kun kortuŝa kvietas ĉarmo.

MATENE

En rondela vendo milda
Jen knabina jupo flirta
 versas maten-rughan lumon,
Lagan songon, kaj koloras.
lotusfloroj bonodoras.
 Novespero super brumon.

ANIMO DE LOTUSFLORO

kiom da petaloj de novlun'
Vi jam plektis el ĉielo nun?
Honte etendiĝas virga blank',
Rid' gracias sub matena sun'.

RAKONTETO DE LAGO LOTUSA

Lagon verdiginte, zefiro tenera
Senbure embuskis sur akvo somera

enkaptis figuron de suno falanta,
kolektis rondaĵon de luno levanta.

Trempite en nokto plena de pluvetoj
la suno kaj luno fariĝas verdaj pladoj
freŝeme ekflosi sur akvo susura
subteni someron de lago lotusa.

Sed luna animo neniel ŝanĝebla
elakviĝas kiel lotusa blankfloro.
kaj suna animo neniel ŝanĝebla
arde flamas kiel lotusa ruĝfloro.



Bai Juyi (772 - 846)

ĜOJO PRI OLDAĜO

Hodiaŭ en spegulo klara
griziĝis miaj barb' kaj haroj.
Mi jam en jaro sesdek-kvara,
ĉu mankas senilaj amaroj ?

Precoj pri mia oldiĝo
bedaŭras kaj suspire ĝemas.
Sed mi ridetas en feliĉo.
Kiu do vere min komprenas ?

Mi drinkas vinon post rideto,
barbpalpe, sentante kontenton.
Sidiĝu do vi en kvieto,
aŭskultu mian argumenton !

Se vivo estus ne ĝojinda,
kial prenu oldon domaĝa ?
Se vivo estus jes ĝojinda,
Multon jam vivis mi oldaĝa.

Sen oldiĝ' venas frua morto,
sen frua mort' - kaduk' lamenta.
Preferu kadukon al morto,
tio estas ver' evidenta.

Cirkulas kaj antikva diro:

